201. Ni laboras per niaj **manoj**.
202. Ĉu ni **manĝas** per la buŝo?
203. Kiom **mankas** por komenci?
204. Mi ferias en la **mar-bordo**.
205. Ĉu vi aĉetis **poŝtmarkojn**?

La sufikso «eg» grandigas la signifon de la radiko.

Li havas manegojn
Ŝi skribis leteregon
Mi aĉetis domegon

206. Ŝi laboras **matene**.
207. Ĉu la tablo estas **meblo**?
208. Mi ne **memoras** la konversacion.
209. Ŝi **metis** la libron sur la meblo.
210. La **metaloj** estas tre utilaj.
211. Lia **metio** estas maristo.
212. La perfraza **metodo** faciligas la studon.
213. La horloĝo **mezuras** la tempon.
214. La kvaron-horo havas 15 **minutojn**.
215. Skribu je la **marĝeno**.

La sufikso «et» mal-grandigas la signifon de la radiko.

Ŝi havas manetojn
Montru la langeton
La ĉemizeto estas blanka

216. La **monato** en-havas 30 tagojn.
217. Kial ĝi estas **monteto**?
218. La montriloj **montras** la horon.
219. **Morgaŭ** komenciĝos la festoj.
220. **Multajn** dankojn, kara amiko.

Profesoro: 5 minutoj. Eksplikoj pri la leciono.

Faciligas, grandigas. En-havas. Kvaron-horo. Kiom. Manĝi. Manki. Memori. Mezuri. Multe.

Kiu komprenas la vorton «ĉiel-arko»?
Faru frazon! Faru demandon!

faltar
costa
margen
aumentar
caserón
sellos de
correos
por la mañana
muebles
acordarse
poner
oficio
medir
cuarto de hora
disminuir
monte
mostrar
mañana
muchas

NORMAS DE LA LECCION

- A) y B) Haga la 12 como de costumbre.
 C) TRATE DE TRADUCIRLA en hoja aparte.
 C2) Escriba y aprenda los colores del arco iris.
 C3) Escriba 5 frases donde intervenga el aumentativo «eg». Ejemplo: Li legis libregon.
 C4) Escriba 5 frases donde figure un diminutivo. Ejemplo: Mi manĝis la paneton.
 C5) Adjunte cuantas observaciones desee.
 D) Envíe para corrección su trabajo del C) al C5).

GRACIAS

C3) Ili lavas la manegojn.
 Ŝi manĝas per la buŝego.
 La kulerego estas sur la tablo.

C4) La birdeto kantas bone.
 Ŝi havas buŝeton.
 Donu al mi kulereton.

Kantu kun ni:

DEK BOTELOJ....

Dek boteloj pendas el la mur', (bis)
 kaj, se falas unu, naŭ restas nur.

~~DEK~~ botelo pendas el la mur', (bis)
 kaj, se falas unu, nulo restas nur.

Mia mano estas longa

Via....

Lia....

Ŝia....

Ĝia....

Nia....

Via....

Ilia....

Perfrazaj ludoj

La homego estis homo.

La fotego

La fiŝego

La dentegoj

La kateto fariĝos kato.

La hundeto....

La birdeto....

La knabeto....

Kiam vi kriis?

....kantas?

....manĝas?

....lernas?

....laboras?

Apendico

Kiu grandigis la foton?

La radikoj de la arboj estas longaj.

Kiom kuras la infano! (Kiom = kvanto)

Kiom doloras miaj dentoj!

Kiom mezuras la kapo?

Demandoj

Kion vi memoras?

Kiu mankas al la klaso?

Kion mankas por fini?

Kion vi liveris?

Kion vi manĝis?

Kion vi forgesas?

KONVERSACIAJ FRAZOJ

Saluton, amikoj!
 Kio estas proverbo?
 Kiu estas la montra pronomo?
 Kion signifas la simpla vorto «ĉi»?
 Kion signifas la prefikso «ge»?
 Ĉu vi obeas viajn gepatrojn?
 Adiaŭ! Ĝis la venonta fojo!

Profesoro: Presentado de la leciono.
 Lernoceloj: La montraj pronomoj. La prefikso «ge»

Proverboj: Homo proponas, Dio disponas.
 Amu domon novan kaj amikon malnovan.
 Matena horo estas plena de oro.
 Kio estas lernita, ne estas perdita.

221. La **muziko** estas bela arto.
 222. Kiu **naĝas** en la maro?
 223. La **natur** estas granda amiko.
 224. La **nazo** estas apud la buŝo.
 225. Mi diris **ne**, ĉu ne?

La moŝtraj pronomoj estas:
Tiu, tiu ĉi.

226. La aero estas **necesa** por ni.
 227. **Neĝo** estas blanka.
 228. Ili **neniam** diris tion.
 229. Ĉu la avo havas **nepojn**?
 230. La ĉevalo estas **nobla** besto.
 231. Kiel vi **nomiĝas**?
 232. Li legas **novan** libron.
 233. La ĉielo estas **nuba**.
 234. **Nun** estas la deka horo.
 235. Mi **nur** havas dolaron.
 236. La infanoj **obeas** siajn gepatrojn.

La prefikso «ge» esprimas La gefiloj dancis
ambaŭ seksojn. La geavoj kantis

237. Kiuj **objektoj** estas en la kesto?
 238. Mi **observas** la naturon.
 239. Ĉu la floroj **odoras** agrable?
 240. Ili parolas **ofte** pri birdoj.

Profesoro: 5 minutoj. Eksplikoj pri la leciono.
 Tiu, tiu ĉi. Siaj. Je. Pri. Ne-n-iam. Montri. Ambaŭ. Obei. Ofte.

Ŝlosilo de frazoj

máxima popular
 demostrativo
 llena
 aprendido
 perdido
 nadar
 nariz

ese
 este

necesario
 nunca
 nieve
 nieto

negro
 noble
 llamarse
 nublado
 ahora
 solamente
 obedecer
 oler
 con frecuencia

Kiu komprenas la vorton «naĝi»?
 Faru frazon! Faru demandon!

NORMAS DE LA LECCION

- A) y B) Haga la 13 como de costumbre.
C) TRATE DE TRADUCIRLA en hoja aparte.
C2) Trate de traducir los proverbios.
C3) Escriba 5 frases con el pronombre «ese». Ejemplo: Tiu estas mia amiko. Y 5 frases con el pronombre «este». Ejemplo: Tiu ĉi estas via libro.
C4) Escriba 5 frases en donde figure el prefijo «ge». Ejemplo: La gekna boj memoras la lecionon.
C5) Adjunte cuantas observaciones desee.
D) Envíe para corrección sus trabajos del C) al C5).

GRACIAS

- C3) Tiu estas Antono.
Tiu komprenas la frazon.
La kuracisto estas tiu.
Tiu ĉi estas Heleno.
Mia filo estas tiu ĉi.
Tiu ĉi kuras tre rapide.
C4) La gefiloj amas la gepatrojn.

Perfrazaj ludoj

Tiu estas via kapo; tiu ĉi estas mia kapo.

... kajero...

...kruro....

...amiko....

Mi iras kun....

Mi loĝas kun....

Mi korespondas kun....

Kial vi manĝas?

....lernas?

....kantas?

....gratulas?

....fororgesas?

....fumas?

....naĝas?

....mankas al la klaso?

Amiko kaj amikino estas geamikoj.

Avo....

Infano....

knabo....

Kiujn meblojn vi konas?

Kiujn metalojn....?

Kiujn tagojn....?

Kiujn librojn....?

Kiujn gasojn....?

Kie vi naĝas?

Kion vi mezuras?

Kion vi montras?

Kiel vi nomiĝas?

Kie vi metas la globkon?

Apendico

Via glaso ne estas plena.

La frazo estas perfekta nun.

Mia nomo estas Karlo.

Ni perdis mian katon.

Mi proponas ekskurson.

KONVERSACIAJ FRAZOJ

Saluton, estimataj amikoj!

Komencu!

Kiu estas la resenda pronomo?

Kion signifas la sufikso «ar»?

Faru simplajn demandojn!

Ĉu vi parolas en Esperanto kun viaj amikoj?

Ĝis la venonta leciono, amikoj!

Profesoro: 5 minutoj. Presentado de la leciono.

Lernoceloj: La resenda pronomo «si».

La sufikso «ar».

Ŝlosilo de frazoj

reflexivo
muchacha
ruborizarse
avergonzarse
ojo
sombra
tío

Diferenco. Kiu estas la diferenco inter modernaj kaj malmodernaj knabinoj?

Malmoderna knabino ruĝiĝas kiam ŝi hontas...

kaj moderna knabino hontas kiam ŝi ruĝiĝas...

naranja

referirse

241. La kato havas du **okulojn**.

242. La **ombroj** de la arboj estas agrablaj.

243. Mia **onklo** nomiĝas Ernesto.

244. La **oro** estas flava metalo.

245. La **oranĝoj** en-havas multajn vitaminojn.

«Si» estas resenda pronomo de la tria persono kiu rilatas al la subjekto.

Ĝi banas sin
Ŝi lavas sin
Ili fotas sin

oreja
hueso
huevo
pagar
página

246. La **orelo** estas la organo de la aŭdo.

247. La suno leviĝas en **oriento**.

248. La **ostoj** estas mal-molaj organoj.

249. La birdoj de-metas **ovojn**.

250. La instruistoj havas grandan **paciencon**.

251. Kie vi **pagis** la jar-kotizon?

252. La libro havas 456 **paĝojn**.

253. La panisto el-laboras la **panon**.

254. La **pantalonoj** estas por la kruroj.

255. Ĉu vi skribas sur la **papero**?

papel
bosque
conjunto
diccionario
hablar
parte
padre
paisaje
pensar
pintar

La sufikso «ar» signifas ensemblo.

Arbaro estas bela
Mi havas libaron
Vortaro estas dika

256. Ĉu vi **parolis** kun mia onklo?

257. La unua **parto** estas agrabla.

258. Kio estas via **patro**?

259. Ni havas kapon por **pensi**.

260. Goya **pentris** «La Maja»-n (: maña).

Profesoro: 5 minutoj. Eksplikoj pri la leciono.

Nomiĝi, leviĝi, finiĝi. El-labori. Resendi. Diferenco. Ruĝiĝi.

Ĉu vi komprenas «oranĝo»?
Faru frazon! Faru demandon!

NORMAS DE LA LECCION

- A) y B) Haga la 14 como de costumbre.
- C) TRATE DE TRADUCIRLA en hoja aparte.
- C2) Trate de traducir el chiste. Cuéntelo en Esperanto.
- C3) Escriba 5 frases con el pronombre reflexivo «si». Ejemplo: Ŝi lavas siajn manojn.
- C4) Escriba 5 frases que contengan un nombre colectivo. Ejemplo: La arbaro estas granda.
- C5) Adjunte cuantas observaciones desee.
- D) Envíe para corrección sus trabajos del C) al C5).

GRACIAS

- C3) Li komencas sian laboron.
Ŝi atendas sian amikon.
Ili fermas siajn librojn.
- C4) La abelaro produktas mielon.
Mi admiras vian dentaron.
La adresaro en-havas la adresojn.

Perfrazaj ludoj

Li pagis sian libron.
Ŝi obeas....
Ĝi montras....
Ili mezuras....

La homaro estas ensemblo de homoj
La numeraro....
La montaro....
La kamparo....

Apendico

La diferenco inter 6 kaj 8 estas 2.
Ŝi hontas kiam ŝi eraras.
La lango estas la organo de la parolo
La muziko rilatas la homojn.
La frazo havas subjekton kaj predikaton.

Kalkulu kaj skribu de 110 al 120.
Kalkulu kaj skribu de 140 al 150.

Demandaro

Kiom mezuras la monton?
Kiom pagis la lernanto?
Kiom manĝas la araboj?
Kiom dormas Karlo?
Kiom mankas por fini?
Kiun obeas vi?
Kion vi observas?
Kiel odoras la floroj?
Kiu pentris la pejzaĝon?
Kial vi pensas tion?

KONVERSACIAJ FRAZOJ

Saluton! Ni komencas la lecionon!
 Kiom da personoj estas en la klaso?
 Kion signifas la sufikso «ul»?
 Kion esprimas la sufikso «aĵ»?
 Faru simplajn demandojn!
 Ĉu plaĉas al vi la konversacio en Esperanto?
 Ĝis revido, karaj lernantoj!

Profesoro: 5 minutoj. Presentado de la leciono.
 Lernoceloj: La sufikso «ul». La sufikso «aĵ».

Ŝlosilo de frazoj

arriba
 alzarse
 silenciosa
 capillita
 valle
 fuente
 con regocijo

La kapeleto: Supre staras sur la monto
 La silenta kapeleto.
 En la valo, ĉe la fonto,
 Ĝoje kantas paŝtisteto. ZAMENHOF

261. Ni parolas **per** la buŝo.
 262. Mi **perdis** mian horloĝon.
 263. Ĉu vi **permesas**, ke mi fumu?
 264. Mi **petas** paperon kaj krajonon.
 265. La **piedo**j doloras multe al mi.

La sufikso «ul» signifas personon kiun karakterizas la radiko. Dikulo manĝas multe
 Pensulo estas klera
 La grandulo fumas

266. Mia amuzo estas pied-**pilko**.
 267. Ĉu la kukoj **plaĉas** al vi?
 268. La **plafono** estas tre alta.
 269. La piedoj estas sur la **planko**.
 270. Kiam estas **plenaj** la ĝardenoj?
 271. Ĝi manĝas **pli** da fruktoj ol da pano.
 272. Tiu infano **ploras** facile.
 273. Ne ploru **plu**, mia filo! Mi petas!
 274. La **plumoj** kovras la birdojn.
 275. Ĉu la **pluvo** abundas aŭtune?

pastorcillo
 por medio de
 perder
 permitir
 pedir, rogar
 pie
 fútbol
 agradar

techo
 suelo
 lleno
 más... que
 llorar
 más
 lluvia
 cuadro
 comida
 lectura

«aĵ» esprimas objekton. La pentraĵo montras ĝardenon
 Mi finis la manĝaĵon
 La legaĵo estas interesa

276. La pom-vino estas el la **pomoj**.
 277. La pantalono estas **por** via onklo.
 278. Kial ili fermis la **portadon**?
 279. Miaj **poŝtoj** estas plenaj.
 280. La **poŝtisto** portas la korespondaĵon.

sidra
 manzana
 para
 puerta
 bolsillo

Profesoro: 5 minutoj. Eksplikoj pri la leciono.
 Pied-pilko. Pli, ol. Plu. Bird-korpo. Al-portas. Pro. Ĉe, plaĉi. Poŝto.

POR LA KONVERSACIO, UZU LA ESPERANTON, KE VI ĴAM KONAS!

Ĉu vi komprenas «pied-pilko»-n?
 Faru frazon! Faru demandon!

NORMAS DE LA LECCION

- A) y B) Haga la 15 como de costumbre.
C) TRATE DE TRADUCIRLA en hoja aparte.
C2) Trate de traducir el poemita. Recítelo en Esperanto.
C3) Escriba 5 frases con el sufijo «ul». Ejemplo: La junuloj estas gajaj.
C4) Escriba 5 frases que contengan el sufijo «aĵ». Ejemplo: La diktaĵo havas erarojn.
C5) Adjunte cuantas observaciones desee.
D) Envíe para corrección sus trabajos del C) al C5).

GRACIAS

- C3) La admiruloj akompanas la artiston.
Barbulo bezonas ĉambron.
La fortulo levis 220 kilogramojn.
C4) Tiu skribaĵo estas de Ernesto.
Ili manĝis multajn dolĉaĵojn.
Tri pentraĵoj pendas el la muro.

Perfrazaj ludoj

Blankulo estas blanka persono.
Fumulo....
Kolerulo....

La ovoj estas pli bonaj ol la pano.
La fruktoj....
La fiŝoj....
La akvo....

Mi manĝas per....
Mi pensas per....
Mi ligas per....

Agrablajoj estas aĵoj aŭ objektoj agrablaj.
Belajoj....
Desegnaĵoj....

Apendico

Antono staras antaŭ la pordo.
Supre staras la kapo; mal-supre, la piedoj.
Estas fonto ĉe la valo.
La paŝtisto kantas ĝoje.
La montoj karakterizas Svisio-n.

Meksika kanteto

La nigrablato, la nigrablato,
Jam ne povas iri plu.
Ĉar ĝi ne havas, ĉar al ĝi mankas,
El la postaj kruroj du!

Mi kuras per miaj piedoj.
....parolas....
....manĝas....
....legas....
....skribas....
....pensas....

Li ploras pli ol Antono.
....observas....
....naĝas....
....obeas....

Demandaro

Kion vi perdis?
Kion li pensis?
Kiu perdis la horloĝon?
Kion vi petas?
Kiu permesis fumi?
Kion plaĉas al vi?

KONVERSACIAJ FRAZOJ

Saluton! Kiel vi fartas?
 Ĉu plaĉas al vi kanti?
 Kiuj estas la fundamentaj numeraloj?
 Vi progresas rapide, kara lernanto!
 Kion signifas la sufikso «an»?
 Faru simplajn demandojn!
 Ĝis la venonta leciono!

Profesoro: 5 minutoj. Presentado de la leciono.
Lernoceloj: La kanteto «Asuncion'».
 La sufikso «an».

Ŝlosilo de frazoj

ni
 verter
 porrón
 poder
 coger
 casi
 listo para

La kanteto «Asuncion'»

La vino kiun hav' Asuncion'
 ne estas nek blanka, nek havas kolor'. (bis)
 Asuncion'! Asuncion'!
 Verŝu al mi el tiu vin' al bek-pot' (bis).

281. Ĉu vi **povas** atendi min?
 282. Ĉi **praktikas** la lingvon.
 283. Kien vi **preferas** iri?
 284. Ĉi **prenas** la kreton.
 285. Mi havas **preskaŭ** 1.000 ptojn.

«an» signifas **membron,**
loĝanton, partianon.

Madrido, madridano
 Kristo, kristano
 Familio, familiano

286. Ĉu vi estas **preta** por komenci?
 287. Ni parolas **pri** muziko.
 288. Ni perdis **pro** li.
 289. La **problemo** estas kompleksa.
 290. La citron-arbo **produktas** citronojn.
 291. Oceano estas **profunda**.
 292. Kial la lernantoj **progresas** rapide?
 293. Mi **promenas** en la ĝardeno.
 294. Ĉi **prononcas** tre bone.
 295. Mi **pruntis** mian globkon.

Morgaŭ, post-morgaŭ, hodiaŭ,
hieraaŭ, antaaŭ-hieraaŭ.

296. Ĉu la **punkto** estas ortografia signo?
 297. Kial estas mal**puraj** viaj manoj?
 298. Ĉi **rakontis** belan fabelon.
 299. Vi komprenas **rapide**.
 300. Mi **rememoras** ofte miajn amikojn.

acerca de

perder

pasear
 pronunciar
 prestar
 pasado mañana
 anteaŭer

punto
 limpio
 relatar
 recordar

Profesoro: 5 minutoj. Eksplikoj pri la leciono.
 Pro. Mal-pura. Prunti. Globko. Nek. Verŝi.

NORMAS DE LA LECCION

- A) y B) Haga la 16 como de costumbre.
- C) TRATE DE TRADUCIRLA en hoja aparte.
- C2) Escriba 5 frases en las que intervenga el sufijo «an». Ejemplo: Emilio estas kristano.
- C3) Copie y repita hasta su automatización los adverbios de tiempo que acompañan.
- C4) Traduzca y cante la cancioncilla española.
- C5) Adjunte cuantas observaciones desee.
- D) Envíe para corrección sus trabajos del C) al C4).

GRACIAS

- C2) La kamparanoj laboras la kampojn.
La mohometanoj ne trinkas alkoholaĵojn.
Li estas amerikano.
- C3) Hodiaŭ estas mardo kaj morgaŭ....
Hieraŭ estis dimanĉo kaj antaŭ-hieraŭ....
Morgaŭ estos vendredo kaj post-morgaŭ....

Prefrazaj ludoj

Familiano estas membro de la....
Asociano....
Madridano....

Kiom pruntis Antono?
Kion prenis lernanto?
Kion manĝis li?
Kiom da difinitaj artikoloj estas?

Hodiaŭ estas merkredo kaj morgaŭ....
Morgaŭ estos dimanĉo kaj post-morgaŭ....
Hieraŭ estis ĵaŭdo kaj antaŭ-hieraŭ....

Li perdis sian pilkon
Ŝi pagis sian....
Ĝi obeas sian....
Ili montras sian....

Li parolas pri....
Ŝi pensas pri....
Ili kalkulas pri....

Vi ploras pro....
Ni manĝas pro....
Mi kantas pro....

Apendico

La oro estas nek blanka nek nigra
La bek-poto estas por trinki vinon.
Mi skribas per glov-krajono.
Post-morgaŭ estos festo.
Silentu la geinfanoj!

Demandaro

Kiu ploras facile?
Kiu venos morgaŭ?
Kion vi preferas?
Kion vi rememoras?
Kiu estas preta por komenci?
Kiu pruntis la boaton?
Kiu rakontis tion?

Kalkulu laŭt-voĉe de 280 al 290

KONVERSACIAJ FRAZOJ

Saluton, estimataj gelernantoj!

Kioma horo estas?

Ĉu estas la unua matene?

Kion signifas la sufikso «obl»?

Ĉu vi scias la horon?

Kion signifas la sufikson «on»?

Faru simplajn demandojn!

Ĉu vi scias prononci bone?

Praktiku!

La leciono estas fininta! Ĝis!

Profesoro: 5 minutoj. Prezento de la leciono.

Lernoceloj: La horloĝo. La sufiksoj «obl»

kaj «on».

Ŝlosilo de frazoj

cuarto
media
antes
recibir
rico
reír
mirar
tantas veces
repetir
descansar

río

bata
redondo
rosa
astuto
arena

juicioso
salado
cantidad
saludar
cordialmente
sangre
saber
ciencia

La horloĝo kaj la horo

La unua; la unua k dek minutoj; la unua k kvarono; la unua kaj duono; la unua k tri kvaronoj aŭ kvarono antaŭ la dua; dek minutoj antaŭ la dua.

301. Vi ne **respondas** mian demandon.

302. Paŭlo **ricevis** tri librojn.

303. Tiu horloĝisto estas tre **riĉa**.

304. Kial **ridas** via amikino?

305. Ili **rigardas** la belan promenejon.

«obl» **montras tiom-foje** La duoblo de 4 estas 8
la kvanton. La trioblo de 2 estas 6

306. **Ripetu** la ekzercojn.

307. Ĉu la lernantoj **ripozis** bone?

308. La **rivero** akvumas la oranĝ-arbojn.

309. Ĉu via **robo** estas nova?

310. La Tero estas **ronda**.

311. Ne estas **rozoj** en la ĝardeno.

312. Bernardo estas **ruza**.

313. La **sablo** estas apud la maro.

314. Ĉu la infano estas **saĝa**?

315. La akvo de la maro estas **sala**.

«on» **diras la kvanton** La duono de 6 estas 3
kiom-foje dividita. La triono de 6 estas 2

316. Ŝi **salutas** vin kore.

317. La fruktoj estas tre **sanaj**.

318. La **sango** estas ruĝa.

319. Ĉu vi **scias** la novaĵon?

320. Geografio estas **scienco**.

Profesoro: 5 minutoj. Eksplikoj pri la leciono.

Akvumas. Kvarono. Novaĵo. Tiom-foje. Promenejo. Kiom-foje. Kvanto. Scii.

Kion signifas «saĝa» en hispano?
Faru frazon! Faru demandon!

NORMAS DE LA LECCION

- A) y B) Haga la 17 como siempre.
- C) TRATE DE TRADUCIRLA en hoja aparte.
- C2) Cambiando de hora, recorra el ciclo de «El reloj» por escrito y oralmente.
- C3) Escriba 5 frases donde intervenga el sufijo «obl». Ejemplo: Li pagis la duoblon.
- C4) Idem. del sufijo «on»: Donu al li la duonon.
- C5) Adjunte cuantas observaciones desee.
- D) Envíe para corrección sus trabajos del C) al C5).

GRACIAS

- C2) La tria; la tria k dek-minutoj; la tria k kvarono; la tria kaj duono; la tria k tri kvaronoj aŭ kvarono antaŭ la kvara; dek minutoj antaŭ la kvara; la kvara.
- C3) Mi vidas la duoblon ol vi.
Li ricevis la trioblon.
Hodiaŭ, ĝi havas la kvinoblon da loĝantoj.
- C3) Ili pagis la duonon.
Ni ricevos la dekonon.
La kvarono de ok estas du.

Perfrazaj ludoj

Kion vi rigardas, respondas, petas, pentras?

La duono de 12 estas....
La triono....
La kvarono....
La sesono....

La duoblo de 4 estas....
La trioblo....
La kvaroblo....
La kvinoble....

Apendico

Li pagis tri-foje la kvanton.
Mi dividis 12 per 2: egalas 6.
La patro-lando de la judoj estas Israelio.
Kiom estas la duoblo de 5?
Kiom ricevis la instruisto?

Demandoro

Kion vi scias fari?
Kion ŝi rakontis?
Kiu progresas rapide?
Kie vi promenas bone?
Kiel ŝi prononcas?
Ĉu vi scias studi?
Ĉu vi scias perdi?
Ĉu vi scias sidi?
Ĉu vi scias observi?

KONVERSACIAJ FRAZOJ

Bonan matenon, karaj amikoj!
 Ĉu vi estas superstiĉa?
 Kion signifas la prefikso «mis»?
 Kion signifas la sufikso «uj»?
 Diru tri onigajn numerojn!
 Diru tri obligajn numerojn!
 Faru simplajn demandojn!
 Ĝis revido, geamikoj!

Profesoro: 5 minutoj. Prezento de la leciono.
Lernoceloj: La prefikso «mis».

Superstiĉa:

—Ĉu vi kredas vere, ke mal-feliĉo rezultiĝas se oni edziĝas en mardo?

—Kompreneble; kial vi atendas, ke mardo faru escepton de la regulo?

321. **Se** vi preferas, ni iros morgaŭ.
 322. Li kantas **sed** vi ploras.
 323. Tiu **seĝo** estas mal-konforta.
 324. Tiu ĉi **semajno** ni ferias.
 325. Mi preferas lakton **sen** akvo.

«mis» signifas erari. Mi miskomprenis la eksplikon
 Mi misripetis la frazon
 Mi misprononcis la vorton

326. Ni **sendos** al vi oranĝojn.
 327. Kion vi **serĉas**?
 328. Karlo **sidas** la filinon.
 329. La **signo** de la adicio estas kruco.
 330. Saĝa infano **signifas** bonan infanon.
 331. La vokaloj formas la **silabojn**.
 332. La **silento** estas oro.
 333. Viktoro **skribas** leteron.
 334. Dum somero, mi multe **soifas**.
 335. Ĉu la **skatolo** estas malplena?

«uj» signifas en-havilo de La paperujo estas plena
 La salujo estas sur la tablo
 La kafujo ne en-havas kafon

336. Nikolao **spiras** forte.
 337. Mia prefera **sporto** estas korbo-pilko.
 338. La ĉielo estas plena da **steloj**.
 339. La **stomako** faras la unuan digeston.
 340. Ĉu la urbo estas ensemblo de **stratoj**?

Profesoro: 5 minutoj. Eksplikoj pri la leciono.
 Se. Sed. Mal-konforta. Sen. En-havilo. Serĉi. Soifi. Sidi.

Kion signifas la vorto «soifi»?
 Faru frazon! Faru demandon!

Ŝlosilo de frazoj

resultarse
 casarse
 excepción
 si
 pero
 silla
 semana
 sin

errar
 enviar

buscar
 sentar
 significar
 silencio
 escribir

tener sed
 vacía
 contenedor
 respirar
 deporte
 estrella
 estómago-
 calle

NORMAS DE LA LECCION

- A) y B) Haga la 18 como de costumbre.
C) TRATE DE TRADUCIRLA en hoja aparte. Relate el chiste en E-o.
C2) Forme 5 frases donde intervenga el prefijo «mis». Ejemplo: La lernanto miskomprenis ĝin.
C3) Escriba 5 frases donde intervenga el sufijo «uj». Ejemplo: La salujo estas sur la tablo.
C4) Adjunte las observaciones que desee.
D) Envíe para corrección sus trabajos del C) al C4).

GRACIAS

- C2) Ŝi mislokis la florojn.
Ili misaŭdis la konversacion.
Ni misskribis la ekzercojn.
C3) La sukerujo estas plena.
La paperujo estas apud la skrib-tablo.
La panujo estas sur la seĝo.

Perfrazaj ludoj

Li skribis misadreson.... malbone adreson.

Ŝi misatentis sian amikon....

Li miskonis sian koron....

Ili miskomprenis la eksplikojn....

La paperujo estas por la paperoj.

La ovujo....

La panujo....

La laktujo....

Mi saludas, sed vi....

Mi ripozas, sed vi....

Mi ridas, sed vi....

Se vi soifas....

....ripetas....

....praktikas....

....deziras....

....preferas....

....ŝatas....

Apendico

Ĉu vi diras la veron?

Mi konas la rezulton de la laboro.

La edzo kaj la edzino estis en la festo.

Esperanta regulo estas sen esceptoj.

Jesuo mortis en kruco.

Demandaro

Kion vi respondas?

Kie vi sidiĝas?

Kie vi ripozas?

Kial vi ridas?

Kion vi rigardas?

Kiu soifas?

Kion signifas en hispano?

Kion vi serĉas?

Kiun sporton vi preferas?

KONVERSACIAJ FRAZOJ

Saluton, estimataj lernantoj!

Ĉu vi ŝatas la sportojn?

Kion devas havi letero?

Kiujn sportojn vi konas?

Kion signifas la sufikso «aĉ»?

Kiuj estas la fundamentaj matematikaj kalkuloj?

Ĉu vi ŝatas tendumi?

Ĝis la venonta fojo!

Profesoro: 5 minutoj. Prezento de la leciono.

Leĉneceloj: La letero. La sufikso «aĉ».

La letero: Alicante, la 2-an de januaro 1985.

Estimata amiko!

Mi skribas vortojn por deziri al vi Feliĉan Nov-jaron! Ni kunvenis hieraŭ kaj parolis pri via bela ĵando. Ĉu vi estos en nia maja Renkontiĝo? Ĉar la vetero estas tre agrabla, ni organizas ekskursojn. Ĉu ne estas via ŝat-okupo? Skribu al ni longan leteron. Korajn salutojn, via, amike,

Vincento

341. Ŝi **studas** kaj praktikas la lecionon.

342. Ĉu ĝi havis **sukceson**?

343. Mi metas **sukeron** en la kafo.

344. Kial la **suno** estas fonto de vivo?

345. Ni **supozas** ke vi komprenas.

«aĉ» signifas malperfektan objekton.

Papero, paperaĉo

Seĝo, seĝaĉo

Gazeto, gazetaĉo

346. Mi pied-iras **sur** la planko.

347. Ĝi estas agrabla **surprizo**.

348. **Ŝajnas**, ke vi ne komprenas.

349. Kiuj **ŝatas** la sciencojn?

350. Niaj libroj estas en la **ŝranko**.

351. La ŝtuparo havas dek **ŝtupojn**.

352. La **ŝuoj** protektas la piedojn.

353. Ĉu tiu **tablo** estas el ligno?

354. Mi skribas sur la nigra-**tabulo**.

355. La **tago** en-havas 24 horojn.

La kvar fundamentaj matematikaj kalkuloj estas: adicio, subtraho, multipliko kaj divido.

356. La **teamo** al-venis hieraŭ

357. La **telero** estas plena da pomoj.

358. Ili rigardas la **televidon**.

359. La **tempo** kuras rapidege.

360. La **ŝipo** vojiras sur la maro.

Profesoro: 5 minutoj. Eksplikoj pri la leciono.

Nov-jaro. Kun-venis. Ŝat-okupo. Al-veni. Ŝranko.

Ĉu vi komprenas la vorton «ŝatas»?

Faru frazon! Faru demandon!

Ŝlosilo de frazoj

carta

palabra

reunirse

de mayo

encuentro

tiempo

afición

cordial

estudiar

éxito

azúcar

sol

suponer

imperfecto

sobre

gustar

armario

escalón

zapato

mesa

pizarra

día

equipo

plato

eso

traducir

NORMAS DE LA LECCION

- A) y B) Haga la 19 como acostumbra.
C) TRATE DE TRADUCIRLA en hoja aparte.
C2) Forme 5 frases en donde intervenga el sufijo «aç». Ejemplo: Mi ne aĉetos tiun libraĉon.
C3) Escriba una cartita con fecha, direcci3n, saludo, contenido, despedida, firma. Las frases deben ser cortas y f3ciles.
C4) Adjunte cuantas observaciones desee.
D) Envie para correcci3n sus trabajos del C) al C4).

GRACIAS

- C2) La 3evala3o kuris tre malrapide.
Ne diru vorta3ojn!
Sur la tablo estis papera3oj.

Alicante, la 2-an de majo de 1984

- C3) S-ro Petro SOUSA
Strato Bela, 5
PORTO - Portugalio—

Estimata samideano!

Mi deziras korespondi kun vi. Mi estas komencanto. Mi estas studento, 16-jara kaj ŝatas multe la sportojn. Kion vi faras? Mi sendas al vi poŝt-kartojn kaj malnovajn poŝt-markojn. Ĉu vi ŝatas vojaĝi? Ĉu vi vizitis mian landon? Kiam vi ferias? Mi esperas ricevi de vi longan leteron. Kore vin salutas,

F. ZARAGOZA BRAEM

Perfrazaj ludoj

Libra3o estas....malbona libro.
Lampa3o, doma3o, porda3o, k.c.

Apendico

Niaj anoj renkontiĝas jare.
Viaj ŝuoj estas tie.
Studu! tiel vi progresos.
Ni organizas ekskursojn.
Vi parolas hispanon bone.

Demandaro

Kial vi studas?
Kiam vi soifas?
Kiel vi prononcas?
Kiom kostas televidaparato?
Kiun teamon vi preferas?
Kiaj ŝuoj estas viaj?
Kion vi ŝatas?
Kion vi tradukas?
Kiom da ŝtupoj havas la ŝtuparo?
Kial vi tusas?

KONVERSACIAJ FRAZOJ

Saluton! Kio estas sur la tablo?

Komencu vi, Irena!

Kion signifas la sufikso «ig»?

Kion signifas la sufikso «iĝ»?

Per kio vi tranĉas la panon?

Ĉu vi serĉas la tualetejojn?

Faru facilajn demandojn!

Ĝis la venonta kaj lasta leciono!

Profesoro: 5 minutoj. Presentado de la leciono.

Lernoceloj: La sufikso «ig». La sufikso «iĝ».

Ĉe Sevilla (: sevilja). Mi vidis vin; vi dancis en la foiro.

El mia kor' el-iris

dolĉa sopiro.

Kia korpeto!

Ha, mia kara bela

brunulineto!

Rafael de San Millán

361. Kiu **tranĉis** la panon?

362. Vi parolas facilege, aŭ **tre** facile.

363. Esperanto estas vera **trezoro**.

364. Ili **trinkis** glason da akvo.

365. La ŝuisto trinkas **tro** da biero.

La sufikso «ig» signifas fari.

Facila, faciligi

Tro, troigi

Kompreni, komprenigi

366. Ĉi ne **trovas** mian glob-krajonon.

367. Kie estas la **tualetejo**?

368. Ne fermu **tuj** la pordon.

369. Tiu templo havas du **turojn**.

370. Li **tusas** ĉar li mal-varmiĝis.

371. Ne **tuŝu** la pentraĵon.

372. La ĉef-**urbo** de Hispanio estas Madrido.

373. ESPERANTO estas tre **utila** lingvo.

374. Mi **uzas** mian kapon.

375. La vortaro **valoras** cent pesetojn.

La sufikso «iĝ» signifas fariĝi.

Mi leviĝas je la oka

Li nomiĝas Petro

Ĝi metiĝas en la poŝo

376. Ĉu la somero estas **varma** sezono?

377. **Venu** ĉe mi morgaŭ matene.

378. Kie oni **vendas** trinkaĵojn?

379. Esperanto nepre **venkos**!

380. Hodiaŭ, la **vento** estas tre forta.

Profesoro: 5 minutoj. Eksplikoj pri la leciono.

El-iri. Brun-ul-in-et-o. Malvarmigas, malvarmiĝas.

Ĉu vi scias la signifon de «tuŝi»?

Faru frazon! Faru demandon!

Ŝlosilo de frazoj

feria
salir
suspiro
cuerpecito
morenita
cortar
muy
beber

demasiado
encontrar

aseo
inmediatamente
torre
toser
tocar/tacto

ciudad
valer
hacerse
caliente
venir
vender
vencer
viento

NORMAS DE LA LECCION

- A) y B) Haga la 20 como acostumbra.
C) TRATE DE TRADUCIRLA en hoja aparte. Recite el poemita.
C2) Escriba 5 frases donde intervenga el sufijo «ig». Ejemplo: Mi pretigas la lecionon.
C3) Escriba 5 frases donde intervenga el sufijo «iĝ». Ejemplo: Sidiĝu, mi petas.
C4) Adjunte cuantas observaciones desee.
D) Envíe para corrección sus trabajos del C) al C4).

GRACIAS

- C2) Mi lumigās la ĉambron.
Ŝi plenigas la botelon.
Li lacigas min per sia konversacio.
C3) La leciono finiĝas je la oka.
Kiel vi nomiĝas?
Atentu! Fariĝas malfrue.

Perfrazaj ludoj

La studo faciligas.... la lernadon.

Ŝi plorigas....

Ili daŭrigas....

La sporto junigas....

Li aboniĝos....

Ŝi amuziĝis en....

Ili kuniĝas sub....

Ni troviĝas en....

Li perdiĝis....

La vento estas tro....

La telero....

La rivero....

Itala kanteto

Venas la nokto.

Ĉe l'firmamento

Brilas unua

Stel' el arĝento.

De sur la maro

Voko magia:

Sankta Luĉia!

Sankta Luĉia!

Apendico

Bruna junulino atendas vin.

Mi deziras paroli al la ĉefo.

Ŝi dancis la valson.

Ili iris al la foiro.

Ŝi sopiras pro amo.

Demandaro

Kio estas telero?

Kion vi tranĉas?

Kiam vi tusas?

Kion vi trinkas

Kion vi studas?

Kion vi supozas?

Kion vi ŝatas?

Kion vi forĝesis?

Kiom vi gajnas?

Kiom vi trinkas?

Kion vi trovis?

Kial vi tusas?

Kiom valoras la ŝuoj?

KONVERSACIAJ FRAZOJ

Saluton! Kial vi lernis esperanton?
 Deklamu la poemeton «Ĉe Sevilja»!
 Kion esprimas la sufikso «ec»?
 Kiom da reguloj havas la Plena Gramatiko?
 Faru simplajn demandojn!
 Gratulojn pro via granda sukceso!
 Ĝis revido en la Perfektiga Kurso!

Profesoro: 5 minutoj. Presentado de la leciono.
 Lernoceloj: La sufikso «ec».

Ŝlosilo de frazoj

estepa
 pielroja
 cazar
 exigir
 Cañón del
 Colorado
 grito

ventre
 verdad

Angla kanteto: Sur montoj kaj step' indianoj
 Ĉasadas kun ruĝ-famili';
 Kaj se vi postulas parolon,
 El kanjon' respondas la kri:

381. Ĉu ni digestas per la **ventro**?
 382. Ĉu **vere** vi parolas japanon?
 383. **Verŝu** akvon al mi!
 384. Ŝi atendas vin morgaŭ **vespere**.
 385. Kiu **vestiĝas** kiel junulino?
 386. Hieraŭ, la **vetero** estis mez-bela.
 387. Ĉu vi **veturis** per bicikledo?
 388. Tiu ĉi **viando** estas mal-mola.
 389. Ĉu vi **vidas** kiom da floroj!?
 390. La **vilaĝo** estas apud la rivero.

escanciar
 por la tarde
 vestirse
 tiempo atm.
 viajar
 carne
 pueblo
 varón
 cristal
 cara

«ec» esprimas ĝeneralan
 abstraktan kvaliton.

La juneco estas bela
 La longeco estas 3 m.
 Mi ŝatas la liberecon

391. Ili preferas la **vinon** al la pom-vino.
 392. La **viro** kaj la virino formas gevirojn.
 393. Kie ŝi perdis siajn okul-**vitrojn**?
 394. La **vizaĝo** estas antaŭ la kapo.
 395. Ĉu la **vojaĝo** estas al Francio?
 396. Tiu **vojo** estas komforta.
 397. La **vokaloj** estas kvin.
 398. La junularo **volas** iom da kompreno.
 399. Mi respondos **volonte** viajn demandojn.
 400. La vortaro estas ensemblo de **vortoj**.

viaje
 querer/deseo
 con mucho gusto
 palabra

Profesoro: 5 minutoj. Eksplikoj pri la leciono.
 Ruĝ-familio. Vestiĝi. Mez-bela. Okulvitroj. Volonte. Stepo. Postuli. Vetero.

NORMAS DE LA LECCION

- A) y B) Haga la 21 como de costumbre.
C) TRATE DE TRADUCIRLA en hoja aparte.
C2) Escriba 5 frases donde intervenga el sufijo «ec». Ejemplo: Mi ŝatas la liberecon.
C3) Copie y traduzca el cantarillo «Esperanto». Cántelo.
C4) Adjunte cuantas observaciones desee.
D) Envíe para corrección sus trabajos del C) al C4).

GRACIAS

- C2) La amikeco valoras pli ol la mono.
La gajeco estas vivo.
La riĉeco ne estas ĉio.

En la dens-afrika ĝangalo,
luktante sen-ĉese pro ĉi',
ĵam solvis la lingvan problemon:
per tantam' eligas la kri':

Rekantajo:

Esperanto estas la lingvo por ni, por ni.
Esperanto estas la lingvo por ni.

Indianoj, nigruloj, eskimoj,
urbanoj, kaj buboj, kaj ni
ĵam uzas la Zamenhof-lingvon.
Do, vivu, prosperu la kri':

Renkantajo

Volonte mi legos ĝin!
....tranĉos....
....trinkos....
....studos....

Perfrazaj ludoj

Beleco estas ĝenerala kondiĉo de bela.
Grandeco....
Longeco....

Apendico

Mi digestis bone la manĝaĵojn.
Japanio estas en orienta Azio.
La nazo estas en la mezo de la vizaĝo.
Mi vizitos Svedio-n.
La viando estas mez-bona.

Demandaro

Kial vi tusas?
Kiom ĝi valoras?
Kiu venis hieraŭ?
Kion vi vendas?
Kiu vestis la infanon?
Kion vi vidas?
Kiu volas pilkon?
Kiu vestiĝis kiel bebo?
Kia vetero faras hodiaŭ?
Kion vi volas trinki?

Karaj amikoj:

VI FINIS LA ELEMENTAN KURSON DE ESPERANTO. Jam vi povas komuni-ki parole kaj skribe kun la esperantistaro. Eble vi bezonas praktikon. Por tio kaj por grandigi vian vortoprovizon, vi devas:

- A) Komenci la Perfektigan Kurson. En tiu Kurso, ankaŭ senpaga en nia Publika Kolegio, ni uzas la «Perfrazo Metodo»-n denove. Konsistas el 30 sendaĵoj kiuj enhavas 600 frazo-vortojn fundamentajn, kiuj, kune kun la 400 frazo-vortoj de la Elementa Kurso, estos 1.000 fundamentaj mone-moj. Ili vin permesos formi pli da 25.000 vortojn sufiĉaj por iradi tra la senfina mondo de ESPERANTO.
- B) Aĉeti kelkajn librojn:
«Lexicón Sopena», vortaro Esp. Hisp., Hisp. Esp.
«Amuzaj Dialogoj» de Albert LIENHARDT.
«Zamenhofa Legolibro»,
«El Esperanto», de PIERRE JANTON.
«Paŝoj al plena posedo», de WILLIAM AULD.
- C) Aboni nacian gazeton:
«HEJS», hispana junulara gazeto,
Barrencalle Barrena, 7, 1.º BILBAO-5.
«Sabadell Esperantista». Apdo. 407. SABADELL, Barna.
«BOLETIN», Federación Española de Esperanto,
Rodríguez de San Pedro, 13, 3.º 28015 MADRID.
- Aboni internacian gazeton:
«KALEJDOSKOPO», infana gazeto-67. Av. Gambetta, PARIS.
«JUNA AMIKO», por la junuloj,
Kenyérmezo u 6. 1368 BUDAPEST (Hungria).
«HEROLDO de Esperanto», duonmonata informa gazeto,
J. Ramón Jiménez, 28, 6.º A. 2836 MADRID
«SENNACIULO», laborista gazeto-67. Av. Gambetta, PARIS.
«ESPERANTO», ĝenerala gazeto,
Nieuwe Binnenweg, 176. 3002 ROTTERDAM (Holanda).
«HORIZONTO» neŭtra gazeto,
P.º Marina Moreno, 35, 4.º 50011 ZARAGOZA.
«MONATO» - Internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo. Ĉefperanto: FLANDRA ESPERANTO-LIGO, Frankijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
- D) Korespondi kun esperantistoj. En la esperanta gazetaro vi trovos abundajn adresojn.
La Mondo estas via amiko. Sed, de nun, vi devas esprimiĝi en E-o, skribe kaj parole. Pere de la Esperanto, ke vi jam konas, centoj da Kongresoj, Konferencoj, Renkontiĝoj, Aranĝoj, Festoj, Konkursoj atendas vin.

NUN, KURAĜON KAJ ANTAŬEN!


EKZAMENO POR LA ELEMENTA DIPLOMO DE ESPERANTO

- A) Respondu dek demandojn.
- B) Skribi leteron da pli ol dek linioj. (Dato, adreso, saluto, teksto, adiaŭo kaj subskribo.)
- C) Fari komenton pri liber-vola temo.
- D) Fari kvin demandojn al la Juĝantaro.

JEN ESTAS LA DEK DEMANDOJ

1. Kiel vi nomiĝas?
2. Kie vi loĝas?
3. Kiom jara vi estas?
4. Kiu estas via okupo, metio aŭ profesio?
5. Kial vi lernis Esperanto-n?
6. Kiam vi komencis la studon de Esperanto?
7. Ĉu vi studis sola aŭ per profesoro?
8. Ĉu vi partoprenis en iu Kongreso aŭ Renkontiĝo?
9. Ĉu vi apartenas al iu Grupo aŭ Asocio?
10. Kiu estas via plej grava deziro?

- (A) Respondu skribe la dek demandojn.
- (B) Faru la aliajn partojn de la Ekzameno kaj sendu ilin al ni.
- (C) Ni korektos kaj resendos al vi (se sukcese) la Elementan Diplomon de Esperanto.



Esperanto!

Un idioma para todos:

Idiomo por ĉiuj:

4-11-1989

La presente edición de "ESPERANTO, una lengua para todos", conmemorativa del "1987 - CENTENARIO DEL IDIOMA ESPERANTO", y destinada a 5.000 Centros de Enseñanza y Profesores de Lengua, de España, ha sido posible gracias a la colaboración de:

Grupo "Ĉiam Esperanto", de CALLOSA DE SEGURA (Alicante).

Colegio Público "Primo de Rivera", de CALLOSA DE SEGURA (Alicante).

Excmo. Ayuntamiento de CALLOSA DE SEGURA (Alicante).

Grupo Esperanto, de ALICANTE.

Grupo "Cartago Nova", de CARTAGENA (Murcia)

Grupo Esperanto "Ricardo Codorniú", de MURCIA

Barcelona Esperanto - Centro

Caja de Ahorros de Alicante y Murcia.

Federación Española de Esperanto.